

vivi lucide

libro, unuhore legebla,
kiu inversigos vian
mondon de interne
eksteren

tim freke

vivi lucide

libro, unuhore legebla,
kiu inversigos vian mondon de interne
eksteren

tim freke

Tim Freke estas spirita pioniro, kies verko tuŝis la vivojn de centoj da miloj da homoj. Li verkis pli ol tricent librojn, tradukitajn en kvindek lingvojn, inkluzive iun el la supra sesopo de la ‘Surpriza Furorlibro’ en Amazon, kaj ‘Libro de la Jaro’ de la Daily Telegraph.

Tim uzis sian vivon por esplori mondan spiritualismon kaj li eblas gvidi aliajn en rektan sperton de la vekiĝa stato. Vivŝanĝantajn retiriĝojn, spertigajn seminariojn kaj amuzantajn vesperojn de “improviza filozofio” li prezentas tramonde kaj interrete.

Por rigardi senpagajn filmetojn de Tim, sciigi pri venontaj okazaĵoj kaj aliĝi al lia entuziasmiga ‘WAKE UP CALL’ retletero, visitu www.timfreke.com.

Kopirajto © 2005 de Tim Freke. Ĉiuj rajtoj rezervitaj por ĉiuj landoj. Neniun parton de ĉi tiu eldonaĵo oni rajtas kopii, redisdoni aŭ fordoni sen la skriba konsento de la aŭtoro/eldonisto aŭ la kondiĉoj transdonitaj al vi.

Tradukis el la angla lingvo

Harm Roeters

kun kora danko al Rob Moerbeek

Imagu momenton ke vi sonĝas. Viaj sonĝmondaj dramoj tute okupas vin, kiam mistera strangulo aperas en via sonĝo. Li krablas al vi kaj ion eksterordinaran li mallaŭte enorele flustras: “Ŝŝ! Vekiĝu. Vi sonĝas.”

Ĝenas vin, sed vi restas trankvila. Vi scias ke la plej bona maniero trakti homojn klare nekonformiĝintajn estas amike kapjeseti esperante ke ili foriros.

Sed la strangulo persistas. “Mi scias ke ŝajnas nekredeble al vi ĉi-momente, sed vi sonĝas.”

Vi koleriĝas kaj diras: “Tio estas absurda!”

La strangulo estas netuŝita: “Ĉu vere absurda? Ĉu vi neniam rimarkis kiom da rimarkindaj strukturoj kaj strangaj koincidoj via sperto enhavas? Kvazaŭ enestas iu kaŝita signifo? Nu, estas tiel, ĉar ĉi tio estas sonĝo.”

Konfuzas vin. “Kion vi celas?” La strangulo eksplikas: “Ĉimomente vi pensas ke vi estas persono parolanta al mi, sed tio estas nur kio vi provizore ŝajnas esti en ĉi tiu sonĝo. La vera vi estas la sonĝanto. Kaj ĉi tiu tuta sonĝmondo ekzistas en vi.”

Vi sentas vin perpleksa. “Ĉu vi petas min ke mi kredu ke mi imagas paroli al vi? Certe vi ne estas produkto de mia imago?!”

La strangulo afable ridetas. “La persono kiu vi ŝajnas esti, ne imagas tiun interparoladon kun mi, ĉar tiu persono estas parto de la sonĝo. Sed envere, vi estas la sonĝanto kiu imagas ĉion kaj ĉiujn en ĉi tiu sonĝo. Ni ŝajnas esti disiĝintaj homoj havantaj interparoladon, sed fakte ni ambaŭ estas la sonĝanto.”

Paniko ekkaptas vin: “Vi frenezigas min. Mi perdas mian memkomprenon!” La strangulo provas trankviligi: “Ne zorgu, vi nur ekas vekigi. Tio estas sonĝo veka, celita por pli kaj pli konsciigi vin, ĝis vi estas sufiĉe konscia por kompreni ke vi sonĝas.”

Vi estas konfuzita. “Sed mi ne komprenas. Kiel mi vekigi?”

La strangulo rigardas al vi rektokule. “Vi povas vekigi ĉiam kiam vi volas. Vi simple volu vekigi pli ol vi timas tion. Kaj ne estas io timinda. Vekigi sentas bone. Scii ke vi sonĝas

estas la sekreto por ĝui la sonĝon.”

Via maltrankvilo ŝanĝiĝas en ekscitiĝon. Vi volas vekigi. Kaj ju pli vi volas vekigi, des pli vi iĝas konscia ke vi sonĝas. Kaj vi eksentas vin bonfarta. Vi ne plu timas ĉiajn terurojn kiuj povus afflikti vin en la sonĝo, ĉar vi scias ke la vera vi estas sekura. Eĉ se la persono kiu vi ŝajnas esti mortus, estus sendanĝere ĉar efektive vi estas la sonĝanto. Kiel mirinde!

Inundita de dankemo vi ekdankas la strangulon, sed li plupaŝis kaj profunde konversacias kun iu alia, kiu aspektas konfuzita kaj fascinita. Vi postvokas lin: “Kio nun?” Momente li turnas sin al vi kaj larĝe ridas: “Ĝuu la sonĝon. Kaj helpu ĉiujn aliajn ankaŭ ĝui ĝin, ĉar ni ĉiuj estas vi.”

Dum momento vi tie nur staras kaj lasas tiun imponan konsciiĝon klariĝi. Tiam proksime vi vidas kelkajn homojn urĝi sin pri siaj aferoj. Estas tute certe ke ili precize scias, kiuj ili estas kaj kio okazas. Vi ridetas en vi mem, krablas al unu el ili, kaj mallaŭte flustras: : “Ŝŝ! Vekiĝu. Vi sonĝas.”

Ĉu ne estas mirinda sonĝo?

Sed kiel vi reagas, se tio efektive okazus al vi *ĝuste nun*? Ĉar mi estas la strangulo, kaj mi volas proponi ion eksterordinaran...

La vivo ne estas kio ĝi ŝajnas.

Vi ne estas kiu vi pensas esti.

La vivo estas kiel songo.

Kaj vi estas la songanto.

Ĉu vi iam konsciis ke dormante dum nokto vi sonĝas? Oni nomas ĝin “lucide sonĝi”. Mi volas sugesti al vi ke eblas sperti super-vekan staton kiun mi nomas “vivi lucide”, en kiu vi konscias ke la vivo estas kiel sonĝo. Sed mi ne petas vin simple kredi min. Mi volas proponi al vi pensmanieron pri la vivo kiu vekos vin, tiel ke vi mem spertas vivi lucide.

Vivi lucide postulas fundamentan ŝanĝon de vidpunkto. Kompareblas kun rigardo al unu el tiuj figuroj kun koloritaj punktoj kiu subite turniĝas en spektaklan tridimensian bildon. La unua tia figuro kiun mi rigardis, promesis al mi delfenojn, sed mi povis vidi nur punktojn. Mi ne sciis vivigi la figuron. Se mi ĉesos koncentriĝi al la punktoj kaj anstataŭe direktus la okulojn al infinito, mi certe vidos la tridimensian bildon, miaj amikoj asertis. Sed ju pli ili asertis min, des pli mia malsukceso ĝenis min. Tiam subite, dum surpriza sekundo, la magio okazis: Punktoj iĝis delfenoj, vivece saltantaj disde la paĝo al mi. Kaj same subite ili malaperis. Kuriĝigite de mia mallonga sukceso, mi ade rigardis ĝis iom post iom mi travidis. Nun mi povas vidi tiajn tridimensiajn bildojn sufiĉe facile.

Sperti vivi lucide povas aspekti tiele. Komence ŝajnas ridinde, sed restu rigardanta kaj finfine vi komprenos. La truko por vidi tridimensian bildon estas ŝanĝi la vidfokuson. La truko por vivi lucide estas ŝanĝi la pensmanieron. Por tiu ŝanĝo mi volas helpi al vi. Mi volas konigi al vi manieron pensi pri via vivo kiu tute transformos vian vivan sperton.

Mi konsideras honoro ke vi invitis min en vian menson por proponi ĉi tiujn ideojn al vi. Kaj mi ne misuzu vian gastamon malŝparante ajnan valoran tempon. Do la libro estas kiel eble plej konciza per distilado ĝis la simpla esenco de lucida filozofio. Tio kaŭzas riĉe legi. La libro estas gustumenda, ne englutenda. Rapidelegi povus rezultigi mensan misdigeston. Ju pli konscie vi legas, des pli verŝajne vi spertos vivi lucide.

Mi akompanos vin laŭ sep potencaj komprenoj kunlaborantaj por veki vin el la dorma malsano kiu lasas vin senkonscia en la viv-sonĝo. Iuj el ili estas erarige simplaj. Iuj eble aspektas konataj kaj aliaj strangaj, sed mi instigas aliri ĉiun el ili malfermmense kaj plenatente. Antaŭopinii ke vi jam komprenas ĉiujn aŭ ke temas pri sensignifa sensencaĵo, malhelpos vian vekigon! Por ke vi ne nur legu la vortojn kaj la signifo de ĉiu kompreno manku al vi, mi proponas ke vi faru kelkajn filozofiajn eksperimentojn. Per tiuj mi gvidos vin en la sperton vivi lucide: mi prezentos demandojn kaj poste miaj respondoj sekvos. Prenu tempon por fari mem ĉiun eksperimenton kaj esploru ĉu miaj respondoj ankaŭ al vi funkcias. Efektive faru tiel; alie, vivi lucide restos nur stranga ideo.

Antaŭ ol ni komencos nian filozofian travivaĵon, mi nepre klarigu jenan: Komparante la vivon kun sonĝo, mi ne celas malgrandigi ĝin, kvazaŭ iun sensignifan fantazion. La vivo estas tro mirinda por esti nomata “iluzio”, krom se ni flustras la vorton mirege, kiel ni povus ĉeestante ravan magian verkon. Kio povus esti pli grandioza ol ĉi tiu universo, kun ĉiu ĝia multflanka pompo? Ĝia impona vasteco kaj delikata detalo. Ĝia senpersona precizeco kaj intima intenseco. Ĝia kruda neceso kaj volupta sens-ameco. Ĉi tiu vivsonĝo estas vere mirakla.

Ĉi tio estas malgranda libro kun grandaj aspiroj. Vi bezonas malpli ol unu horon por legi ĝin, sed ĝi povus sanĝi vian vivon por ĉiam plu.

Mi instigas legi ĝin senhalte, ĉar pli verŝajne ke vi atingos filozofian klimakson se vi enprenos ĉion en unu fojo. Precipe se estas via unua fojo.!

Mi ne povas promesi veki vin. Vivi lucide estas kiel enamiĝi. Ĝi okazas kiam ĝi okazas.
Oni povas nek perforti nek preventi ĝin.

Sed mi ja povas preni vin al blinda rendezuo kun iuj ekscese aŭdacaj kaj belegaj ideoj.
Kaj - oni neniam scias - povus komenciĝi io grandioza!

Do, lasu min prezenti nian unuan komprenon....

la vivo estas mistero

La ideo ke la vivo estas kiel songo ŝajnas absurda ĉar ni supozas ke ni jam estas ĉiome vekaj. Sed plejofte ni estas tiel senkonsciaj ke ni eĉ ne rimarkas la plej evidentan faktan pri la ekzistado: ĝi estas grandega, mens-inunda enigmo. La vivo estas la patrino de ĉiuj misteroj - sufiĉe laŭvorte! Tamen ni kutime tiel dormas ke ni kapablas fari la tagajn aferojn kvazaŭ vivi estus nerimarkinde.

Kuniru kun mi en filozofia eksperimento kaj esploru la homan situacion...

Jen ni estas."

Renkontantaj unu la alian en ĉi tiu eterna momento kiun ni nomas "nun".

Partoprenantaj en tiu bizara okupiĝo kiun ni nomas "vivo".

Atendantaj la neeviteblan finon kiun ni nomas "morto".

Pri kio temas?"

Ĉu vi scias?"

Ĉu iu ajn vere scias?"

Homoj vojaĝas ĉien en la mondon serĉante misterojn kaj miraklojn, sed kio povus esti pli mistera kaj pli mirakla ol la vivo mem?"

Ne nur kio ĝi estas, sed nure ke ĝi estas."

Kiam oni enfokusigis la Hubble-teleskopon al la nokto ĉielo, ĉiu eta nigra punkto malkaŝis dekojn da galaksioj, kaj ĉiu el ili enhavas milionojn da steloj!"

La universo estas tro grandega por imagi, kaj senfine mistera. Kaj se vi vivos okdek jarojn, vi havos nur kvar mil semajnojn por nur eko de kompreno."

Tio ĝuste proporcias, ĉu ne?"

Nia situacio tiel profunde konsternas ke estas mirege ke ni ne ĉiam perpleksiĝas."

La plimulto el ni ĉirkaŭkuras kvazaŭ vivo temus nur pri tio: certigi enspezon kaj nepensi pri la morto."

Ni neniam haltas por miri."

Ni kondukas kvazaŭ ni precize scius pri kio la vivo temas, kvankam kaŝeme ni scias kontraŭe."

Kvazaŭ niaj vivsupozoj hipnotas nin tentante en duonkonscian ekstazon kiu sentigas nin pri la impona strangeco de la ekzisto."

Nu, ĝis la sapveziko krevas kaj neatendite ni vekigatas."

Eble konfrontado kun la morto ekkondukas nin reen en la vivon. Aŭ la beata inundiĝo de enamiĝo. Aŭ simpla trafenestra lumlinio sunradia."

Kiel ajn la vekigo-voko aspektas, dum mirinda momento ni deskuas la sentecon kiun ni nomas "normaleco", kaj trovas nin mem enmergitaj en grandega, nesondebla, senspiriga mistero."

Ĉu vi iam spertis ion tian?"

Konsciu pri la mistero de la ekzisto ĝuste nun."

La fakto ke kutime ni trovas la vivon memevidenta malgraŭ ke fakte ĝi estas tute mistera, montras kiel senkonsciaj ni kutimas esti."

Niaj viv-opinioj tiel enpakas nin ke ni erare pensas ke nia miskreda mondo egalas realecon - ekzakte kiel ni songatas."

Konsciiĝi pri la mistero de l' ekzisto estas kiel vekigi el songato."

Se vi sentas en misterigita, bone. Ĉar tio pretigas vin por nia dua kompreno...

nun estas ĉio kion vi scias

Kiam ni dormas kaj sonĝas, aferoj ne estas kiel ili ŝajnas. Niaj imagaĵoj tiel okupas nin ke ni ne povas enkonsciigi ke ni sonĝas. Ni kredas scii tion kio okazas, sed vere ni ne scias. Mi volas proponi ke la vivo estas kiel sonĝo. Kaj ke ĝuste nun la vivsonĝo tiel okupas nin ke ni ne povas enkonsciigi ke ni sonĝas. Ni kredas scii tion kio okazas, sed vere ni ne scias.

La plimulto el ni tiel certas pri la ĉi-taga vivkompreno ke tio aspektas ridinda. Sed ĉu ni pravus esti tiel certaj? Mi pensas ke ne. Mi volas proponi ke ĉio pri kio ni fakte scias ke ĝi estas certa, estas tio kion ni spertas ĝuste nun. Kaj se ni vere atentus la sperton de ĉi tiu momento, ni malkovrus ke la vivo estas kiel sonĝo.

Kuniru kun mi en alia filozofia eksperimento kaj kune trapensu...."

Al la plej multaj homoj la ideo ke la vivo estas kiel sonĝo ridindas. Mi estas filozofo, ne evangeliisto, do mi plenfavoras ke oni dubeme akceptas novajn ideojn."

Sed mi ankaŭ plenfavoras ke oni same dubeme akceptas konatajn ideojn."

Ĉu vi estas libera al la eblo ke via nuna vivkompreno povus esti malĝusta?"

Ĉu fakte ekzistas io ajn pri kio vi povas esti absolute certa?"

Ĉu vi povas certi pri la kutima kompreno de la realo, kiun la plej multaj homoj kredas memevidanta?"

Mi pensas ke ne."

La historio montras ke la hodiaŭaj prudentaj certecoj baldaŭ iĝas morgaŭaj folaj superstiĉoj. Ni retrorigardas multajn kredojn de niaj prauloj kaj konsideras ilin frenezaj kaj amuzaj. Ĉu ne eblas ke niaj posteuloj retrorigardos niajn nunajn kulturajn supozojn kaj konsideros ilin same frenezaj kaj amuzaj?"

Ĉu vi povas certi pri viaj propraj personaj konvinkoj?"

Mi pensas ke ne."

Ĉu vi ne ofte sentis vin tute certa pri io, sed poste malkovris ke vi malpravis? Ĉu ne eblas ke vi malkovros ke viaj nunaj kredoj ankaŭ malĝustas?"

Ĉu vi konsentas?"

Vi povas dubi ĉiujn kredojn kiujn vi kredas fidante aliajn homojn, ĉar vi mem ne scias ĉu ili ĝustas."

Ĉu vi pravas?"

Vi povas dubi ĉiujn kredojn bazitajn sur memoroj pri la estinteco, ĉar la memoro estas eraripova."

Jen mens-eksploziva penso, sed ĝi ĝustas, ĉu ne?"

Ĉu ekzistas io pri kio vi povas esti absolute certa?"

Jes."

Vi spertas ion ĝuste nun."

Tio nenegeble veras, ĉu ne?"

Via sperto de ĉi tiu momento ne estas kredo dubebla. Ĝi estas memevidenta certeco."

Via sperto de ĉi tiu momento estas ĉio pri kio vi povas esti absolute certa."

Do, la sola maniero vere kompreni la vivon estas esplori vian propran senperan sperton vivi."

Kia plifortiga enkonsciigo!"

Se vi volas scii tion kio okazas, vi ne povas fidi ke mi aŭ iu ajn alia diru ĝin al vi."

Vi mem devas malkovri atentante tion kion vi spertas ĝuste nun."

Kaj - mi volas sugesti - se vi plikonsciĝos pri ĉi tiu nuna momento, vi malkovros ke la vivo estas kiel sonĝo."

Bonfarta ĝis nun? Ĉar de ĉi tie ĉio eksimilas iom filozofian veturon sur onda fervojo. Firme tenu vin. Aŭ, pli bone, tute maltenu vin! Ĉar ni rapide moviĝos.

Vivi lucide ne estas kredi la teorion ke la vivo estas kiel sonĝo. Estas senpere sperti la sonĝecan naturon de la realeco en ĉi tiu nuna momento.

Mi volas atentigi vin pri kelkaj indikoj kiuj sugestas ke la vivo estas kiel sonĝo. Vi mem povas kontroli ilin en via propra senpera sperto.!

La unua indiko estas nia venonta kompreno. Sed pretigu vin. Defias nian plej bazan supozon pri kiuj ni estas...

vi ne estas persono

Se vi sonĝas, vi ŝajnas esti karaktero en la sonĝo. Sed tio estas nur via ŝajna identeco. Ne kiu vi vere estas. Efektive vi estas la konscio, kiu sonĝas la sonĝon. Ĉi tio estas via esenca identeco. Mi sugestas ke la vivo estas kiel sonĝo. Nunmomente vi ŝajnas esti persono en la vivsonĝo, sed estas nur via ŝajna identeco; ne estas kiu vi vere estas. Via esenca identeco estas multe malpli konkreta kaj multe pli mistera. Vi estas la konscio, kiu observas la vivsonĝon.

Se vi pretas malteni la supozon ke vi estas persono - nur eksperimente – mi indikos kiu vi vere estas...

Esploru la realecon de ĉi tiu nuna momento."

Vi spertas ion ĝuste nun."

Evidente, ĉu ne?"

Do vi estas spertanto de spertoj."

Estas stranga maniero por rigardi al vi mem, sed klare veras, ĉu ne?"

Provu."

Estu spertanto de spertoj."

Estu la konscio kiu observas ĉion kio okazas ĝuste nun."

La prudento, kompreneble, diras ke vi estas persono. Sed eĉ en la ĉiutaga parolo ni diras: "Mi havas korpon", ne: "Mi estas korpo". Kaj ni parolas pri "mia menso" kvazaŭ la menso estas io kion ni posedas, ne io kio ni estas."

Kio estas ĉi tiu mistera "mi" kiu estas nek la korpo nek la menso?"

Estas la konscio, kiu observas la korpon kaj la menson."

Ĉu vi povas kompreni tion?"

Tra vian vivkurson via korpo plimaljuniĝis kaj via menso maturiĝis, sed ĉu vi ne sentas kvazaŭ io restis sama?"

Ĉu la esenca vi ne estas alia nun ol antaŭe kiam vi estis pli juna?"

Kio estas la esenca vi kiu estas konstanta kaj daŭra?"

Estas la konscio."

La konscio estas la konstanta malantaŭo de ĉiuj viaj spertoj."

La konscio estas la senŝanĝa observanto de ĉiuj tiuj ŝanĝoj."

La konscio estas la eterna ĉeesto kiu ĉiam ĉeestas."

Ĉu vi konsentas?"

Ĝuste nun vi estas la konscio observi fluon de spertoj. Ĉi tio estas via ĉiama identeco."

Ene en la fluo de spertoj vi aperas kiel aparta persono. Tio estas via ĉiamŝanĝa apera identeco."

Via apera identeco ne estas kiu vi estas. Estas kiu vi provizore ŝajnas esti."

Iĝos evidente se vi konsideras la tagan sperton vekigi, sonĝi kaj profunde dormi."

Kiam vi dormas kaj sonĝas, la persono kiu vi aktuale ŝajnas esti, malaperas el la konscio kaj vi ŝajnas esti alia persono en alia sonĝmondo."

Via esenca identeco kiel la konscio eterne samrestas, sed via apera identeco tute ŝanĝiĝas ĉiunokte."

Ja, en profunda dormo via apera identeco tute malaperas! Ĉar kiam la konscio estas nekonscia, vi ŝajnas tute ne ekzisti."

La prudento diras ke vi estas korpo en kiu la konscio venas kaj iras."

Sed en via propra sperto, vi estas la konscio en kiu la korpo venas kaj iras!"

Freneza penso, sed veras, ĉu ne?"

Kiam vi sonĝas, via sonĝmondo ŝajnas tre reala - kelkfoje timegige reala – kaj vi kredas ke vi estas la persono kiel kiu vi aperas en la sonĝo."

Sed kiam vi sonĝas lucide, vi scias ke ĉi tio ne estas kiu vi vere estas, ĉar vi scias ke vi estas la sonĝanto observanta la sonĝon."

Se vi volas vivi lucide, ĉesu kredi ke vi estas la ĝuste nun aperanta persono."

Estu la konscio observanta ĉi tiun ĉiam ŝanĝiĝantan momenton."

Kiel vi fartas? Ekkapti malkutimajn ideojn povus simili provi teni sapon en la duŝo. Do prenu mensan spirpaŭzon se vi bezonas.!

Sed ne tro longe, ĉar ni dumvojaĝas al realŝanĝiĝo kiu - sufiĉe laŭvorte - inversigos la mondon de interne eksteren. Kaj tio bezonos multe da filozofia momanto.!

Bone. Ĉu prete por ludi? Kompreno numero kvar estas...

la mondo ekzistas en vi

Kiam vi sonĝas, vi ŝajnas esti sonĝ-persono en sonĝmondo, sed efektive vi estas la konscio, kaj la sonĝmondo ekzistas en vi. Same, ĝuste nun vi ŝajnas esti persono en la vivsonĝo, sed efektive vi estas la konscio, kaj la vivsonĝo ekzistas en vi.

Ni rigardu...."

Ĝuste nun vi spertas viajn pensojn kaj la mondon de viaj sensaĵoj."

Ĉu vi konsentas?"

Ni kutime pensas ke niaj pensoj ekzistas en la konscio kaj ke la mondo ekzistas sendepende de la konscio." Sed ĉu ĝustas?"

Se vi atentigas tion kio okazas ĝuste nun, vi vidas ke vi spertas la mondon kiel serion de sensaĵoj: vidaj bildoj, tuŝaj sentoj, malantaŭaj sonoj, ĉirkaŭaj odoroj."

Kaj sensaĵoj ekzistas en la konscio, ĉu ne?"

Ĉio pri kio vi konscias, ekzistas en la konscio, alie vi ne prikonscius!"

Do kio estas la konscio?"

La konscio ne estas io en via sperto. Estas malpleno kiu entenas ĉion kion vi spertas." Ĝustas, ĉu ne?"

Iĝu konscia pri vi mem kiel vasta malpleno, en kiu ĉio ekzistas kion vi ĝuste nun spertas."

Ĉi tiuj presitaj literoj kiujn vi legas sur ĉi tiu paĝo, ekzistas en la konscio."

Ĉi tiuj ideoj eĥantaj en via menso, ekzistas en la konscio."

Ĉio kion vi vidas kaj aŭdas kaj tuŝas kaj imagas, ekzistas en la konscio."

Via korpo ekzistas en la konscio."

La mondo ekzistas en la konscio."

Vi povus ŝajni fizika korpo en la mondo, sed efektive vi estas la konscio kaj la mondo ekzistas en vi."

Se tio ŝokas vin, jen plie."

Vi ne ekzistas en la tempo!"

Vidu vin mem ĝuste nun."

La tempo estas la eterna fluo de ĉiam ŝanĝiĝantaj aĵoj, kiujn la konscio observas."

La tempo ekzistas en la konscio."

La konscio estas ekster la tempo."

Vi estas la sentempa konscio songanta ke ĝi estas persono en la tempo. Ekstreme!"

Ĉu vi suferas filozofian vertiĝon?

Nu, firme sidu, ĉar nia kvina kompreno fakte estas ege granda ideo...

ção estas unu

Kiam ni songâs, ni ŝajnas esti unu el multaj karakteroj en nia songê-dramo, sed efektive, ĉiujn kaj ĉion imagas unu songanta konscio. Estas same ĝuste nun. Ni ŝajnas esti multaj apartaj individuoj, sed efektive ni ĉiuj estas malsamaj karakteroj en la vivsongo kiun songas la viv-songanto. Kaj tiu estas kiu ni vere estas. Ni estas unu konscio kiu songas sin mem kiel multajn individuojn en la vivsongo.!

Ni ekrigardu...."

Kiel persono, vi havas malsamajn mensajn kaj fizikajn ecojn ol mi."

Ĉu vi konsentas?"

Via apera identeco distingas sin de mia apera identeco."

Sed ĉu via esenca identeco kiel konscio distingas sin de mia esenca identeco kiel konscio?"

Ne."

Kiel konscio, vi estas daŭra, observanta ĉeesto. Kaj kiel konscio, ankaŭ mi estas."

Kiel konscio, vi ne estas en spaco aŭ tempo. Kaj kiel konscio, ankaŭ mi ne estas."

Kiel konscio, ni estas maldistingeblaj."

Ni ŝajnas esti malsamaj, sed esence ni estas samaj."

Ĝustas, ĉu ne?"

Ni havas nian esencan identecon kiel konscion komuna."

Kiel konscio, ni ĉiuj estas unu."

Ni estas unu konscio kiu songas sin mem kiel multajn malsamajn personojn en la vivsongo."

Ni estas unu konscio kiu spertas la vivsonĝon el la malsamaj vidpunktoj de ĉi tiuj malsamaj personoj."

Vere grandege!"

Ĉu vi ĝuas la veturon?

Ne surpriziĝu se vi sentas kiel se vi estas en *La Matrigo* aŭ *Alicio tra la spegulon*. Ĉar iel vi estas. Krom ke la viv-rakonto estas eĉ pli plena de ironiaj disvolvaĵoj.

Vivi lucide estas kompreni ke vi estas kaj la heroo de via aparta rakonto kaj la imago kiu koncipas la tutan kosman dramon.

Tio signifas ekkapti nian sesan komprenon...

vi estas paradokso!

Kiam vi sonĝas, vi estas kaj la fonto de la sonĝo kaj karaktero en la sonĝo. Via identeco estas imanente paradoksa. Same, ankaŭ via ĝuste nuna identeco estas imanente paradoksa. Vi estas kaj la fonto de la vivsonĝo kaj karaktero en ĝi. Vi estas la vivsonĝanto imaganta vin mem kiel specifan personon en la vivsonĝo. Identigante vin kun via viv-persono, vi restos malkonscie kaptita en la vivsonĝo. Vivi lucide okazas kiam vi iĝas konscia pri ambaŭ polusoj de via paradoksa naturo.

Provu..."

Vi ŝajnas korpo en la mondo."

Turnu tion."

Vi estas la konscio, kaj la mondo ekzistas en vi."

Provu denove."

Vi ŝajnas persono en la tempo."

Turnu tion."

Vi estas daŭra ĉeesto kiu observas ĉiam ŝanĝiĝantan fluon de spertoj."

Provu denove."

Vi ŝajnas aparta individuo."

Turnu tion."

Vi estas la vivsonĝanto kiu spertas la ekziston el specifa vidpunkto."

Ankoraŭ unufoje."

Vi ŝajnas karaktero en la vivsonĝo."

Turnu tion."

Vi estas la vivsonĝanto, kaj ĉio estas vi."

Vivi lucide estas konscie esti ĉio kio vi estas."

Vekiĝi al via esenca identeco kiel la konscio ne negas vian individuecon. Kontraŭe."

Vivi lucide estas kompreni kiel gravas via individueco. Ĉar sonĝante ĝin mem kiel vi, kiel individuo, la vivsonĝanto povas sperti la vivsonĝon."

Vivi lucide sentas vere fortigita kiel persono, ĉar vi scias ke la krea energio de la tuta universo antaŭenpuŝas vin en via vivo."

Vivi lucide ne neas la ravojn kaj dramojn de la ĉiutaga sperto. Ĝi ŝarĝas la vivon per novaj signifo kaj senco."

Ĉio kion vi spertas, estas montriĝo de via esenca naturo. Do ĉio montras al vi ion pri tio kiu vi estas - kiel sonĝo."

Vi ade forĝsonĝas novajn situaciojn kiuj donas al vi la eblon iĝi pli konscia."

Vivi lucide estas tutkore partopreni la ordinaran vivon kiel epopean aventuron de vekigo."

Vivi lucide ne estas reiri en ian malligiĝintan staton de enlumiĝo. Tio estas ĝui la plivigliĝan staton de enviviĝo!"

Ni vojaĝis longegan distancon en mallonga tempo, do ne surpriziĝu senti vin iom kapturita pro filozofia horzonsufero.

Tamen, jen ni estas, ekzakte kie ni ekis. Konsciaj pri la nuna momento.

Nenio ŝanĝiĝis. Tamen ĉio ŝanĝiĝis. Ĉar vekigi fundamente aliformigas kiel sentiĝas esti persono en la vivsonĝo.

Kaj tio kondukas nin al la klimakso de nia filozofia realeckontrolo kaj nia sepa kompreno...

esti unu estas ami cion

Kio estas amo? Ni amas iun kiam ni estas tiel proksimaj ke ni scias ke ni ne estas disiĝaj. Amo estas tio kion ni sentas enkonsciiginte ke ni estas unu.

Kutime ni supozas ke ni estas nur la persono kiu ni ŝajnas esti. Do ni sentas nin ligitaj al homoj kiujn ni brakumas en nia limigita kompreno pri la demando kiuj ni estas, ekzemple niaj amikoj kaj familio. Ni estas malamikemaj al homoj kiuj minacas nian personan memon kaj indiferentaj al ĉiuj aliaj.

Nia amo haltas tie kie nia memsenco ĉesas. Sed kiam ni enkonsciigis ke ni estas ĉiuj kaj ĉio, ni trovas nin mem intime ligitaj al ĉiuj kaj ĉio. Kiam ni scias ke ĉio estas unu, ni spertas amon senliman.

Kontrolu."

Renkontu min en ĉi tiu momento."

Tiuj vortoj etendiĝas tratempe traspacede, kunligante nin unu al la alia."

Mi konscias ke vi legas. Ĉu vi konscias ke mi skribas?"

Jen ni estas."

La unu vivsonĝanto renkontas sin mem en malsamaj formoj."

Ŝajne disiĝa. Esence sama."

Ĉu vi komprenas?"

Kiel sentiĝas scii ke ni ne estas disiĝintaj?"

Kiel sentiĝas esti unu kun ĉiuj kaj ĉio?"

Al mi ĝi estas sperto de komunio kaj kompato."

Estante unu kun ĉio, mi amas ĉion."

Kiam mi vekigās al unueco, mi sentas senliman amon tiel profundan kaj kortuŝan ke ĝi ĉirkaŭbrakas la vivon kun ĉiuj ĝiaj ekstazo kaj doloro."

Mi partoprenas en niaj komunaj ĝojo kaj sufero."

Kaj mi trovas ke miaj mememaj antaŭjuĝoj anstataŭiĝas per sopiro ke ĉiuj amas vivanti."

Kiam mi scias ke mi estas la vivsonĝanto, mi volas ĝui la vivsonĝon en ĉiuj miaj multaj maskovestadoj."

Mi volas malpezigi nian komunan suferon por ke ni povu kune festi la miraklon de la ekzisto - sen timo, subpremado aŭ mizero."

Ĉu ankaŭ vi ne volas tion?"

Ekde nememorebla tempo saĝaj viroj kaj virinoj asertis al ni ke la amo estas la sola solvo por niaj problemoj. Kaj ili pravas."

Nur la amo povas sanigi la disiĝojn inter ni, ĉar la amo estas la scio ke ni ĉiuj estas unu."

Kiam ni supozas ke ni estas nur disiĝintaj individuoj, ni agas laŭ niaj limigitaj propraj profitoj, nekonsiderante la suferon kiun ni povus kaŭzi al aliaj."

La iluzio de disiĝo kondukas nin al mememeco kaj sufero."

Sed iĝi konscia pri la realo de unueco kondukas al la senmema deziro ĉesigi ĉiujn suferojn kaj krei universalan bonstaton."

Kiam ni enkonsciigas ke disiĝo estas iluzio, ni komprenas ke konflikto neniam estas inter ni kaj ili, sed ĉiam ni kontraŭ ni."

Ĉi tiu konsciĝo havas grandegajn implicaĵojn."

Signifas ke vundi iun alian estas nur vundi nin mem."

Signifas ke venĝo - eĉ kontraŭ la plej abomena krimulo - estas denove vundi nin mem."

Signifas ke milito - negrave kiel justa - estas groteska memdifektiĝo."

Pensu pri ĉiu sennecesa sufero kaŭze de nia erara kredo ke ni estas disiĝintaj."

Imagu nun kiel facile ni povus alformigi nian komunan sperton de la vivo, se ni simple vivus lucide ĉio-amante."

Imagu momenton kiel bone la vivsonĝo estus se ni nur povus vekigi!"

Vivi lucide estas la simpla sekreto aliformigi la vivsonĝon el koŝmaro de disiĝo en ĝojan festadon de la ekzisto kiun ni volas ke ĝi estu."

Mi skribas ĉi tiujn vortojn al vi ĉar mi volas ke ni vekigu."

Mi vidas kia miraklo vi estas."

Vi estas senfina eblo ludanta ke ĝi estas persono."

Vi estas la mistero de la vivo montranta sin."

Mi celebras vin."

Vi estas malsama ol mi kaj tamen ni estas unu."

Kaj nur ĉar ni ambaŭ estas kaj disiĝaj kaj unu, ni povas ami unu la alian."

Belege!"

Mi volas ke vi vidu vin mem kiel mi vidas vin, por ke ni povu helpi unu al la alia ĝui ĉi tiun grandan sonĝon de vekigi."

Por ke ni povu inspiri unu la alian kiam ni sentas nin lucidaj kaj enamaj."

Kaj konsolu unu la alian kiam ni sentas nin perditaj kaj solaj."

Por ke ni povu akompani nin hejmen."

Por ke, kiam la komuna komato erare vidata kiel la vera vivo kaptas min, vi povu memorigi min ke mi vivu lucide."

Vi povus esti tiu afabla strangulo kiu mallaŭte flustros...

vekiĝu